

- b. *kernofruktoj* (drupa); la plej interna tavolo (la endokarpo) de la fruktopario (la perikarpo) fariĝas ŝtonmalmola ujo enhavanta semeron (pyrena aŭ putamen); Oni distingas:
1. *unukernajn* (monopyrena); ĉerizo, rubuso, migdalo, kokoso.
 2. *plurkernajn* (di-, tri-, tetra-, pentapyrena); kornuso, sambuko, ilekso.
- c. *pomfruktoj* (pomum); vd. 131 h. La urnoforme elkreskinta florbazo kunkreskas kun la pario de la ovolujo. Kune ili formas la fruktokarnon, kies plej interna tavolo (endocarpum) fariĝas ledeca; pomo, piro, sorpo (Sorbus L.).

SEMO (semen).

139. *Semero* estas evoluinta ovolo; ĝi estas ligita al la *placento* (placenta) per *funiklo* (funiculus); vd. 140. *Semero* aŭ grajno estas ĉirkaŭita de *semer-* aŭ *grajnyaŭto* (spermodermis; vd. 141), kiu tegas la *semerkernon* (nucleus); vd. 143. En la kerno troviĝas la *ĝermo* (embryo); vd. 144.

FUNIKLO (funiculus).

140. *Funiklo* estas fadenforma kunligilo inter *semero* kaj *placento*. Kelkfoje ĝi elkreskas kaj estigas:
- a. *semermantelon* (arillus).
 - b. *umbilikbuleton* (stropholia).

SEMERHAŬTO (spermodermis).

141. La tego de *semero* nomiĝas *semerhaŭto*; ĝi povas esti:
- a. *hara*; la haroj (coma) povas formi *semertufon* (pappus).
 - b. *ala* (alatus).
- Semerhaŭto* kelkfoje konsistas el du tavoloj:
- a. *ekstera tavolo* (testa).
 - b. *interna tavolo* (tegmen); la interna tavolo plej ofte estas membraneca.
142. Ĉe *semerhaŭto* estas distingeblaj:
- a. *umbiliko* (hilus), la cikatro de la funiklo.
 - b. *pordeto* (micropyle), la tre malgranda aperturo, tra kiu envenis la polenertubeto; sub la pordeto ĉiam troviĝas la *ĝermradiko* (radiculus).
- La rando de la pordeto kelkfoje elkreskas, formante:
- a. *ĝermverukon* (caruncula).
 - b. *falsan semermantelon* (arillodium), kiu tute ĉirkaŭas la semeron.

SEMERKERNO (nucleus).

143. La tutaĵo, kiun ĉirkaŭas la *semerhaŭto*, nomiĝas *semerkerno*; partoj de la *semerkerno* povas esti:
- a. *ĝermo* (embryo); vd. 144.
 - b. *albumeno* (albumen).

ĜERMO (embryo).

144. *Ĝermo* konsistas el:
- a. *ĝermradiko* (radiculus), kiu estigas la ĉefradikon; la *ĝermradiko* de la Gramenacoj estas ĉirkaŭita de *radik-ingo* (coleorhiza).
 - b. *ĝermlobo(j)* aŭ *kotiledono(j)* (cotyledo), la unuaj „folioj”, la *germfolioj*.
 - c. *ĝermtigo*; la parto inter la *ĝermloboj* kaj la *ĝermradiko* nomiĝas *subloba internodaĵo* (internodium hypocotylum).
 - d. *ĝermtufo* (plumula), mallonga tigeto, la *superloba internodaĵo* (internodium epicotylum), kun unu aŭ kelkaj embriaj folietoj; ĉe la unulobaj plantoj la unua folieto ofte ĉirkaŭas la elkreskantan *ĝermtigeton*, estigante *tigingon* (coleoptilum). *Rim.* Dum la tempo kiam la *ĝermanta planteto* vivas de la *ensemera rezervnutraĵo* oni ĝin nomas *ĝermulo* (plantula).

408.92 : 415

KONSILOJ AL ESPERANTAJ AŬTOROJ

Kiel redaktanto kaj recenzanto mi havis abundan okazon konstati ke eĉ bonegaj esperantistoj uzas nian lingvon ne ĉiam neriproĉeble, kaj mi volas tuj aldoni ke mi ne pretendas fari escepton al tiu regulo. Tamen ni devas laŭeble eviti lingvajn riproĉindaĵojn. Por tio necesas treege kritika sinteno rilate al propra scio Oni prefere dubu kaj, rezulte de tiu dubo, konsultu vortarojn por konfirmi aŭ korekti sian opinion pri la ĝusta formo aŭ la ĝusta signifo de iu vorto, ol kun miscerteco pri sia scio simple skribi malĝustajn formojn kaj esprimojn, ĉar tiaj misin-

struas kaj ŝancelas la legantojn. Sendube ni povas tiel eviti tiajn erarojn kiel *inicii* anstataŭ *inici* (Belarto, p. 4). Ja se la aŭtoro stumblas, la redaktoro devas rimarki kaj korekti la erarojn. Jes ja! Sed niaj redaktoroj ordinare devas fari sian redaktan laboron en siaj liberaj horoj, kiuj ne estas sufiĉaj por ĉiuj iliaj taskoj kaj por ebligi la bezonatan ripozon. Oni do ne miru ke ili ne vidas ĉiun riproĉindaĵon. Konkludo: la aŭtoro ne tro fidu sian scion, pli ofte konsultu vortarojn, kaj se eble donu sian manuskripton al kompetenta kaj kritikema esperantisto por kritiko, antaŭ ol sendi ĝin al redakcio aŭ eldonisto.

Kelkajn ĝeneralajn konsilojn mi povas doni ĉi tie pro tio, ke mi konstatis ke kelkaj eraroj estas oftaj aŭ eĉ iom ĝeneralaj.

Misuzo de la sufiksoj -ec-, -ig-, kaj -iĝ-.

La sufikso *-ec-* signifas abstraktan kvaliton, „eston ia”. Ĝi havas paralelojn en multaj naciaj lingvoj, ekz. F: *-ité*, A: *-ity*, kiuj, tamen, estas uzataj ne nur por esprimi abstraktan kvaliton, sed ofte por signifi konkretaĵon. Sub influo de tiuj naciaj lingvoj multaj esperantistoj — eĉ eminentaj — misuzas *-ec-* en tiaj esprimoj kiel: *aktivecoj* (anstataŭ *aktivaĵoj* aŭ *aktivadoj*), *proksimeco* (anstataŭ *proksimo* aŭ *proksimaĵo*), ktp. Do antaŭ ol uzi kunmetaĵon kun *-ec-*, demandu al vi ĉu vere pri abstrakta kvalito temas.

La misuzo de *-ig-* havas du distingendajn kaŭzojn. 1. Misopinio pri la signifo de vortradiko, nome pri transitiveco aŭ netransitiveco de la verbo senpere derivita el la radiko. La komplemento de ĉi tiu misuzo estas misuzo ankaŭ de *-iĝ-*. Ekzemploj: transitiva uzo de la netransitiva verbo *evolui* (anst. *evoluiĝi* aŭ *disvolvi*), kaj erara uzo de *evoluiĝi* (anst. *evolui* aŭ *disvolviĝi*); *komenci* kaj *fini* estas transitivaj, el kio sekvas ke *io komenciĝas kaj finiĝas*. Ankaŭ *ŝanceli*, *naŭzi* kaj *tedi* estas transitivaj, dum *rezulti*, *ŝrumpi*, *enui*, kaj *ŝpruci* estas netransitivaj. *Loki* estas transitiva, kaj *situi* netransitiva, el kio sekvas, ke *mi lokas* (ne: *lokigas*) *ion*, kaj ke *vilaĝo situas* (ne: *estas situita*) *ie*.

Io anstataŭas aŭ ĉirkaŭas ion alian, sed *mi anstataŭigas aŭ ĉirkaŭigas ion per io alia*. En la lastatipaj frazoj la forlaso de *-ig-* estas rekta eraro.

2. Sufiĉe ofte okazas ke ...o ne signifas la agon ...i, ekzemple: *broso*, *martelo*, *krono*, *loko*, *lumo*. En tiaj kazoj por esprimi la agon ...i, vi ne uzu la sufikson *-ig-*, sed la sufikson *-ad-*, do, ekz., ne *lokigo*, sed *lokado*. La samo validas por adjektivoj derivitaj: *terura*, *emocia*, *naŭza*, k.s. signifas *havanta la kvaliton teruri*, *emocii*, *naŭzi*, ktp. Ne uzu *-ig-* en tiaj adjektivoj se la radiko jam enhavas la transitivecon; kaj se via adjektivo devas esprimi ion alian, do uzu alian formon, ekz. *emociiĝema*; aŭ se vi timas, ke oni povus kredi ke ...a estas ne *havanta la kvaliton* ...i, sed *havanta la kvaliton de* ...o, tiam uzu la sufikson *-ad-*, sed ne *-ig-*.

Koncerne prepoziciojn memoru ke *trans* (kun nominativo) signifas: *je la alia flanko de*, dum kun akuzativo ĝi signifas *al la alia flanko de*. Ne uzu ĝin, se ĝi ne havu ĉi tiun sencon, do ne por *en*, *sur*, *super*, *tra*, ktp. *Per* montras la rimedon; ne uzu ĝin por montri la aganton en pasivaj konstruoj, anstataŭ *de* (aŭ *far*), ankaŭ ne en tiaj kazoj, kie *de* estus dubesenca; nek uzu ĝin anstataŭ *kun* aŭ *laŭ* (iri kun grandaj paŝoj; fari ion laŭ iu metodo). Multe misuzata estas la prepozicio *da*, kaj mi konsentas ke ofte estas malfacile decidi ĉu uzi *da* aŭ *de*. Mi tre malaprobas la trouzon de *da* far Stojan en „Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto”. Nepraj kondiĉoj por korekta uzo de *da* estas: 1. ĝi staru post vorto aŭ esprimo substantiva aŭ adverba (*a*) kiu signifas aŭ signifas nombron aŭ kvanton; 2. ĝi staru antaŭ vorto aŭ esprimo (*b*) kiu signifas ion nombreblan aŭ mezureblan laŭkvante. Se la esprimo (*b*) signifas ion nombre aŭ kvante difinitan, tiam (*a da b*) estu pli ol (*b*), t.e. (*a*) estu pli ol unu. 3. La esprimo (*a da b*) nepre estu respondo al la demando *kiom da (b)*, kio implicas ke *kiom da (b)* estu korekta demando. Ĝenerale misa estas la uzo de *da* post *frakcioj* (ekz. *kvarono da horo*) kaj post *ĉiom*. Dubinda estas ĝia uzo post vortoj kiuj striktasence ne esprimas kvanton aŭ nombron: *abundo*, *malabundo*, *vico*, *maro*, k.s. Se oni volas ke tia vorto esprimu kvanton, oni uza *da*, malakaze *de*. Unuakaze (*b*) estas la ĉefaĵo, kaj (*a*) montras nur la kvanton aŭ nombron; duakaze (*a*) estas la ĉefaĵo, kaj (*b*) nur iel difinas, karakterizas ĝin. S-ro C s e h rekomendas jenan provon: Se la uzota esprimo estas respondo al demando „*Kiom da?*”, do uzu *da*; malakaze *de*.

La „malofobio” de kiu kelkaj samideanoj evidente suferas, de tempo al tempo kondukas ilin al absurdaĵoj, ekz. se ili skribas „*plietigi*” kie korekta estus „*malpligrand(eg)igi*”. Alia tre ofta eraro, kontraŭ kiu mi jam protestis en S.R. estas la esprimo „*plej eble*” anstataŭ *kiel eble plej* aŭ *laŭeble (plej)*. Laŭ mi „*plej eble*” korekte povas signifi nur (*tre aŭ plej verŝajne*; ĝi estas la superlativo de *eble*. Estas fuŝe uzi ĝin kun senco alia.

Koncerne la akuzativon de direkto mi rimarkigu ke ĝi ne estu uzata, ĝenerale, post vortoj aŭ esprimoj kiuj mem jam indikas direkton, resp. ne indikas lokon, do, ekz.: *iri en la direkto de ...*, *iri renkonte al ...*, komparu: *turniĝi dekstren*, *en dekstra direkto*, *en sudokcidentan direkton*. La uzo de *reen* havas sencon pro la alisignifa *ree*; kaj kvankam *plu* ĝenerale certe sufiĉas, *plue* aŭ eĉ *pluen* povas kelkfoje eble utili.

Gesinjoroj verkistoj! fajlu viajn manuskriptojn; ne lasu viajn vortarojn sur la breto; helpu plialtigi la lingvaĵan nivelon de nia literaturo; tiel iomete malŝarĝu la redaktistojn de niaj gazetoj. Kaj se, post funda konsidero, vi nepre volas devii, en noto klarigu la kialon.